

Heinrich Heine,
Im Mai

Im wunderschönen Monat
Mai,
Als alle Knospen spran-
gen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat
Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab' ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlan-
gen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana
poemo estas HEINRICH HEI-
NE (*1797-12-13 – †1856-02-
17).*

*Arg-203-402 (2004-03-24
07:28:07)*

*Das Gedicht befindet sich in
Heinrich Heines Werk „Buch
der Lieder“, im Abschnitt
„Lyrisches Intermezzo“, Nr.
I.*

Heinrich Heine,
En Majo

*tradukita de Man-
fredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burgonoj malfer-
miĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin
aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Ger-
mana poemo “Im
Mai” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17)
en Esperanton de
MANFREDO RA-
TISLAVO (Manfred
Retzlaff, Stettiner
Str. 16, D-59302
Oelde, Germanio,
*1938-11-04) en
1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-
203-403 (2004-04-05
20:37:00)*

*La poemo troviĝas en
la „Libro de la kan-
toj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 -
1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,
En dolĉega
Maj'

*tradukita de Friedrich
Pillath*

Printempe en dolĉega
Maj',
Dum la burgonoj kre-
vis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega
Maj',
Dum birda kanto sonis,
De l' kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germa-
na poemo “Im Mai”
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-
02-17) en Esperanton
de FRIEDRICH PILLATH
(†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09
15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis
en Elektitaj Poemoj,
Berlin: Esperanto-Verlag
Friedrich Ellersiek (2a
eldono), 1920, p. 13. La
origina germana-lingva
versio troviĝas en la
„Libro de la kantoj“,
sekcio „Lirika inter-
mezo“ (1822 - 1823),
n-ro I. Pri F. Pillath
vidu ankaŭ la vikipedian
retejon [http://eo.
wikipedia.org/wiki/
Friedrich_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
En la mirinda
bela Maj'

*tradukita de Kálmán
Kalocsay*

En la mirinda bela
Maj',
dum sin burgonoj
fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela
Maj',
dum birda tril' ne
ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Ger-
mana poemo “Im
Mai” de HEINRICH
HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17)
en Esperanton de
KÁLMÁN KALOCSAY
(Kalmano Kaloĉajo,
1911 – †1976).

*Arg-203-1082 (2010-
05-26 12:08:05)*